Jaro 1910-1911. — No 7-8. Marto-Aprilo 1911.

# BULTENO de
# ★ LIBERA PENSO ★

## Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

Sekretario kasisto de la Societo : R. DESHAYS, Sens, Francujo.
Administrejo de la Bulteno : Kl. Beerstr., 45, Antwerpen.
Jarkotizo kun la monata bulteno : 1 Sm (Fr. 2.50)

## Simile kiel la kredulo al Dio, tiel rilatas la pensulo al Universo.

Ecojn kiujn la kredulo alskribas al Dio, tiujn trovas la pensulo en la universo.

La kredulo nomas Dion eterna. Li sin apogas je citaĵo el la psalmaro, kie li legas : « Antaŭ ol fariĝis la montoj, kaj estis kreitaj la tero kaj mondo, vi estis, Dio, de eterno ĝis eterno ». Laŭ opinio de la kreduloj, Dio ĉiam estis kaj estos. Li ekmemoriĝis, ke li kreis la mondon, komprenebl[illegible] el nenio, ĉar ekzistis ja nenio, krom Dio, antaŭ la kreo de l' monde. Laŭ opinio de la kreduloj, Dio eble iafoje ekmemoriĝos, pereigi la kreitan mondon. La kreo kaj la pereo dependas de la emo de l' kreinto. — La pensulo, male, nomas la mondon eterna. El nenio fariĝas nenio. Kaj kie Dio estis antaŭ ol la fariĝo de l' universo ? Tiaj demandoj estas tute nedecaj, laŭ opinio de l' kredulo ; sed ili estas tute decaj, laŭ opinio de la pensulo. La eterneco de la mondo estas la fakto ke la mondo ekzistis deĉiame kaj ekzistos porĉiame — fakto kiun utiligis almenaŭ ĉiuj filozofoj de la pasintaj jarcentoj.

LA KREDULO ASERTAS KE DIO ĈIE ĈEESTAS. « Ĉu mi ne estas Dio kiu estas proksima, kaj tute ne Dio, kiu estas malproksima ? » « Ĉu oni opinias ke iu ajn povu sin kaŝi por ke mi ne lin vidu » ? « Ĉu mi ne estas tiu, kiu plenigas la ĉielon kaj la teron ? » La pensulo neas la ĉieĉeeston de Dio, li klarigas ke tio estas tute neebla. Se Dio estas persono, laŭ imago de l' kredulo, tiam sia aglimo estas la mondo, la verko de siaj manoj kiu staras antaŭ li. Tute prave, laŭ ideo de l' pensulo, la mondo estas senlima, nemezurebla, senfina. Se eterneco estas la ekstremaĵo de la tempo, tiam la estanteco estas ekstremaĵo en spaco. Malplena spaco ja tute ne ekzistas, ĉie ajn oni trovas parteton de l' mondo, se eĉ nur hidrogenon kaj oksigenon.

LA KREDULO RIGARDAS LIN KIEL KIEL ĈIOPOVAN. « Sed nia Dio estas en la ĉielo, ĉion, kion li deziras, li faras ». « Ĉe Dio nenio ajn estas neebla ». Tiujn kaj aliajn bibliaĵojn citas la kredulo, por pruvi la ĉiopovecon de Dio. Se takte kreinto, tenanto kaj direktanto de l' mondo estus ekzistinta antaŭ la mondo, kaj nun ekzistus super la mondo, apud la mondo, en kaj ekster la mondo, tiam certe li povus nek krei, nek detrui ion ajn, ĉar li mem devas obei la leĝojn, kiujn li mem estas donintaj. Nur sub la grafikaĵo de konstituciema monarĥo la kredulo povas imagi al si la ĉiopovulon. Tia antaŭmonda, kaj supermonda Dio ne povas ekzisti. La ĉiopoveco kiun la kredulo alskribas al Dio, [illegible]kto, estas eco de l'universo. En la universo troviĝas ĉiuj ajn forto kaj povoj, per kiuj pereas la malnovaj mondoj kaj el kiuj devenas la novaj mondoj. Sed ĉi tiu detruado kaj rekonstruado de la mondo okazas laŭ difinitaj leĝoj.

LA KREDULO SIGNOMARKAS DION LA NEŜANĜEBLAN. « Vi kaj viaj jaroj ne finiĝos ». « Ĉielo kaj tero pereos, sed vi ĉiam restos la sama». Ankaŭ la neŝanĝebleco estas eco de universo. Tio, kio ŝanĝiĝas, estas la eksteraĵoj ; sed la esenco, la materio kaj la forto restas la samaj. La mondo, samsignifa je universo, restos kiel ĝi estas. La kiomo de l' partejoj, el kiuj konsistas la mondo, kiel la kiomo de l' fortoj kiuj movigas la mondon, restas la samaj. La neŝanĝebleco de la antaŭaj nerifuteble klarigas la teorion. La karboksido kiu antaŭ la finbruliĝo, putriĝo, vaporiĝo ekzistis en la ligno, estas neŝanĝebla, estas eterna kaj nedetruebla, kiel la hidrogeno kaj oksigeno, kun kiuj ĝi autaŭe unuiĝis en la ligno. Tiu ĉi unuiĝo kaj formo en kiuj ĝi aperas estas nedetruebla, la materio mem neniam pereas. La neŝanĝeblon de l' fortoj pruvas la fiziko. De la translacio de l' fortoj legiĝas : « Unu el la plej oftaj translacioj de l' fortoj estas tiu de varmo en meĥanika forto ».

LA KREDULO ALSKRIBAS AL DIO LA ECON DE L' MEMSUFIĈECO, dirante : « Dio sola estas perfekte nedependa, li ekzistas per si mem, nek bezonas alian, li estas memsufiĉa ». — Sed, kial do li kreis la mondon, se li restis memsufiĉa ? Se li ne estus sentinta la bezonon, vivadi socie,

li estus estinta tute sola. Tial oni malprave nomas lin memsufiĉa. Tute prave, do, la universo bone meritas esti nomata memsufiĉa.

LA KREDULO LAŬDAS DION LA ĈIOSCIULON, la ĉiosaĝulon, la ĉiobonulon, la ĉiojustulon. Tiuj estas ecoj, kiujn la kredulo prunteprenis el la homidaro kaj alskribis al Dio. Filozofo estas tute prava kiu diras : « Dio tute ne kreis la homon laŭ sia imago, sed, male, la homo kreis la Dion laŭ sia imago ». La homidoj alcelas multsciulecon, multsaĝulecon, multbonecon, multjustecon. Tian celon, batalon ni nomas prudenta kaj bona, kvankam la homidoj multfoje eraras kaj neplenumas, ŝanceliĝas kaj suferadas. Per eraro al vero ! Per batalo al venko ! Per malĝojo al ĝojo ! La homidoj estas tute prudentaj kaj bonaj, spite la eminenta rolo kiun ludas en tio la penego kaj la malbono. La bataloj en la naturo kaj inter la homidaro estas tute necesaj por purigi ilin ambaŭ. Je ĉiu ajn ŝanĝo ni observis ion konstantan, je ĉiu ajn ŝajna ĥaoso ni observis ordon kaj leĝon, ĉiu disharmonio elsolviĝas en tutharmonion.

KIEL LA KREDULO PENADAS DION REKONI, TIEL ESTAS LA ĜOJO DE L' PENSULO, LA UNIVERSON ESPLORI.

La kredulo kontraŭdiras sin mem se li unuflanke asertas Dion rekoni, dum ke aliflanke li allasis ke Dio estas nekomprenebla, li tiam aldonas ke li ne rekonas Dion per si mem, sed nur per liaj verkaĵoj, t. e. ke li rekonas la kreinton per la kreitaĵo. Sed, la mondo samtempe estas kreinto kaj kreitaĵo, kialo kaj tialo, eksteraĵo kaj internaĵo. Por eltrovi la kialojn kaj tialojn, la pensulo faris la ekkuron unuan kaj plej seriozan. En la kosmologio li kunigas la tutan scion, kio el la mondtuto estas rekonebla al la homa prudento ; en astronomio li okupas sin je la kiomo, movado kaj distanco de l' stelaro ; en la ĥemio li okupas sin je la kunigado de l' partetaro ; en la fiziko je la translacio de l' fortoj, en la geologio je la malvolviĝo de l' tero el fajrfluida globego ĝis la nuntempa formo, en la antropologio li okupas sin je la laŭgrada deveno kaj evolucio de l' homido, ktp.

KIEL LA KREDULO ADORAS DION, TIEL LA PENSULO ADMIRAS LA UNIVERSON.

La kredulo adoras Dion, kiam li starigas al li templojn kie li lin servas, kie li aŭdas la Diparolon, kie li laŭdegas lin, kie li preĝas al li kaj faras ĉiuspecajn oferojn. — La pensulo admiras la universon, kiam li konstruas observejojn, kie li sekvas la stelaron per la giganta teleskopo, kaj eltrovas unu sunsistemon post la alia, kiam li per la mikroskopo ekvidas tutmondon da vivantaj estaĵoj en akvoguteto, kiam li konvinkiĝas ke ĉiuloke, ĉiuforme, regas vivo kaj leĝo.

KIEL LA KREDULO AMAS DION, TIEL LA PENSULO AMEGAS LA NATURON.

La kredulo amas Dion, sed pligrandmezure li timas lin, kiam Dio, la imago de homido, detruas la landojn per malbonvetero kaj ventegoj, per terfrapo kaj tertremo, per milito kaj epidemio. Tagon post tago li komunikas lin, petegas kaj preĝadas ke li agu favore al la homido. — La pensulo, aliflanke, amegas la naturon, ne timante ĝin. Volonte li okupas sin pri tio, por sin instrui kaj ennobligi, sin refreŝigi kaj fortigi, ĝin ĝuante. Li aŭskultetis pri la fortoj de la naturo kaj utiligas ilin por aliformigi dezertojn kaj sovaĝejojn je paradizoj, por ŝirmi kaj protekti sian vivon kontraŭ danĝero kaj tiel plikomfortigi kaj pliagrabligi ĝin.

KIEL LA KREDULO SUBMETAS SIN AL LA ORDONOJ DE DIO, TIEL OBEAS LA PENSULO LA LEĜOJN DE LA NATURO.

La kredulo obeas la moralordonojn, ĉar li kredas, ke ili devenas de Dio, kaj Dio punas la malbonfarulon. Li preĝas al Dio, reverence elparolas lian nomon, obeas la ordonon pri dimanĉo, honoras la gepatrojn. — La pensulo, aliflanke, ankaŭ honoras la gepatrojn, la gefratojn kaj la homaron, obeas la pens- kaj moralordonojn, ĉar li scias, ke ili estas ankaŭ leĝoj de la naturo kiel, interalie, la leĝo de l' pezeco ; kies plunumado estas tiel bona kiel la neplenumado estas malbona. La ecojn homajn li tute ne sufokigas, sed, male, ilin nobligas kaj delikatigas.

KIEL LA KREDULO SIN SENTAS DEPENDA DE DIO, TIEL LA PENSULO SIN SENTAS DEPENDA DE L' UNIVERSO.

La kredulo sin rigardas kvazau kreitaĵo de Dio, ĉar li kredas, ke lia ekzisto, vivo, sorto, estanto kaj estonto estas en Dia mano, kiu prizorgas la liliojn sur la kampo kaj la brutojn en la arbaro, sed kiu plimulte prizorgas la homidon, kiu estas plivalora al la plantoj kaj bestoj. — La pensulo, aliflanke, sin rigardas kvazaŭ li estus naskito de la naturo, ĉar li konvinkiĝas, ke li eliĝis el la interno de la naturo, ŝajne kiel la aliaj estaĵoj, ke li vivadas nur kune, kun kaj en la naturo, kiu donas kaj plibeligas la vivadon ĉirkaŭe, ke, mortinte, li revenos al la naturo, por reviviĝi en aliaj formoj.

B. Schubert.

# AMERIKA SEKULARA UNUIĜO.

La usonaj kaj la eŭropaj liberpensuloj ne ĉiam bone komprenas unu la alian, tial ke la malsimilaj cirkonstancoj de la orienta kaj la okcidenta duonglobo devigas la elekton de tre malsamaj planoj pri la propagando kaj la agado. Eble la usonano kelkafoje inkliniĝas opinii, ke la eŭropaj kontraŭklerikaluloj estas tro batalemaj kaj revoluciemaj, dum tiuj ĉi estas certaj, ke la usonaj preskaŭ tute dormas, kaj nenion faras por la intelekta libereco de la homaro. Kredeble, ambaŭ iom eraras. Ĉie kaj ĉiam, oni devas bataladi kontraŭ la superstiĉo kaj la klerikala tiraneco ; sed ne ĉie devas oni uzadi la samajn batalilojn. En nia usona lando, ni ne bezonas renversi la instituciojn kaj la kutimojn de antikveco. Nia devo estas nur revoki la popolon al la efektivaj principoj de niaj prapatroj. La plej memorindaj fondintoj kaj savintoj de nia lando estis Paine, Franklin, Washington, Jefferson, Lincoln kaj Grant ; kaj el tiuj ĉi, ĉiu estis liberpensulo. De la komenco, oni akceptis la grandan principon de la apartiĝo de la ŝtato kaj la eklezio ; kaj estas necese al ni nur memorigi niajn samlandanojn pri tiu ĉi principo, kaj eduki ilin pri ĝia plena signifo. Por tiu celo, en la jaro 1876, oni fondis organizaĵon, kion oni poste nomis la « American Secular Union » (Amerika Sekulara Unuiĝo). Pro diversaj kaŭzoj, la Unuiĝo ellasis siajn ĉiujarajn kunvenojn depost la morto de sia tiama Prezidanto, Sro. Eugene Macdonald, antaŭ kelkaj jaroj. Aparte grava kaj interesa, tial, estis la kunveno de la Unuiĝo, kiu okazis en Ĉikago, la 25an - 27an de novembro 1910. Al la nuna skribanto, kiu vojaĝis de Nov-Jorko por ĉeesti la kunvenon, oni difinis la honoron malfermi la unuan kunsidon, kaj bone akcepti la ĉeestantojn, kiuj venis de ĉiu flanko de Usono, por pripensadi kaj agadi por la rajtoj de la homaro.

Oni decidis celadi pli ol iam la plenan venkon de la apartiĝo de la ŝtato kaj la eklezio, kaj amike ricevi ĉiujn partianojn de tiu ĉi ideo, nekonsiderinte iliajn proprajn opiniojn pri religiaj temoj. Estis aparte agrabla, aŭskulti la fervorajn paroladojn de kelkaj delegitoj el la bohemaj liberpensuloj. Kvankam ili sufiĉe bone uzadis la anglan lingvon, mi devis rimarki, ke, eĉ en naciaj kunvenoj, la komuna komprenado de nia bela helpa lingvo multege faciligus la interkomunikiĝon. La entuziasmo kaj la harmonio de la kunveno estis tre rimarkindaj ; kaj oni ne povas dubi ke de nun la laboroj de la usonaj liberpensuloj estos pli energiaj kaj fruktoportaj ol iam. Ĉiu usona ano de Libera Penso devus aliĝi al sia nacia organizaĵo por bataladi por nia grava afero. Oni sendu dolaron al Sro. E. C. Reichwald, 141 So. Water St., Chicago, I. 11, kaj tiel fariĝu ano de la Unuiĝo.

James F. Morton, Jr.

# LIBERPENSA KRONIKO

La anoj de Libera Penso estas insiste petataj, sendi raportojn pri la okazaĵoj en sia regiono, kiuj rilatas al nia afero. Ankaŭ trafaj artikoloj kaj precipe tradukaĵoj de gravaj ĵurnaloj estas ĉiam dezirataj. Se ne tuj estas loko por ili, ili servos por malpli frua bulteno. Ĉiu kunlaboru laŭforte !

VARSOVIO. — Verdikto en la afero de verko « Dio Jesuo ». La 21an de februaro 1911a en la 6a kriminala departamento de Varsovia distrikta juĝo oni decidis la aferon de Andreo Niemojewski akuzita pro aro da blasfemoj en lia verko « Dio Jesuo » (punpropono : senigo je kelkaj rajtoj kaj ekzilo).

Verdiktantaro konsistis el : vicprezidanto Dumitraŝko, juĝejanoj Kolĉanowski kaj Frydlander ; akuzanto prokuroro Nimander. La akuzito defendis sin mem kun la helpo de sciencaj fontoj kaj de ĉielglobuso. Post trihora diskutado interne je malfermitaj pordoj la juĝantaro donis verdikton liberigantan kaj neniigis la konfiskon de l'verko.

Inter multaj gratuloj, kiujn la aŭtoro ricevis el diversaj landoj kaj pro kiuj li kore dankas ĉiujn, la plej karakteriza estis telegramo de profesoro Artur Drews el Karlsruhe Germanujo : « Hura, vivu la libera scienco ! »

— Pro la honora titolo de honormembro de nia societo Andreo Niemojewski per tiuj ĉi linioj esprimas sian dankon kaj deziron de disvastgo al nia ideo sur la fundo de komuna lingvo.

Fr. Sandecki.

HISPANUJO. — Multobliĝas en Hispanujo la nombro de la pure civilaj ceremonioj, edziĝoj, enterigoj, k.c. Ĵus okazis en Valencio sen interveno de ekleziaj aŭtoritatoj, la edziniĝo de F-no Maria Blasco, filino de la famekonata verkisto S-ro Blasco Ibanez, aŭtoro de « La Katedralo », kaj de tiom da altvaloraj romanoj. — Ne mankas en nia lando multe pli progresemaj liberpensuloj, kiuj, sin liberiginte ne nur de la Eklezioj, sed ankaŭ de la Ŝtato, solenigas popolajn ceremoniojn ĉe siaj societaj sidejoj : unu el tiaj popolaj geedziĝoj okazis antaŭ nelonge en Elche (Prov. de Alicante).

PIAJ FOLIOJ. — S-ro Nakens, direktoro de « El Motin », estas unu el la plej malnovaj kaj senlacaj apostoloj de la Libera Penso en Hispanujo. Nun li elpensis tre bonan propagandilon, presigante malgrandajn broŝurojn, kiujn li nomas « Piaj Folioj », kaj kies serio konsistas el dek numeroj kun jenaj titoloj : For la laikaj lernejoj ! — La virino ĉe la Eklezio. — Kial vi ne konfesas vin ? — La skapolrubandoj. — Katolikoj, vigle pri la folioj ! — La Sankta Misio. — La komunio. — Agado kontraŭklerikala. — Sekulara pastraro, defendu vin ! — Mortu Satano !

Poste komenciĝis nova serio, kun titolo : « Ignaciaj Folioj », el kiuj jam aperis : La spirito de S-ta Ignacio de Lojola. — La doloroj kaj ĝuoj de S-ta Ignacio. — La spirita direktado.

Tiuj folioj estas haveblaj ĉe la Direktejo de « El Motin », Strato de Alberto Aguilera 52, Madrid, po Pes. 0.60 por cent, kaj Pes. 5. por mil. Multaj estis disdonataj ĉe la pordo de la preĝejoj, k.c. ; jam okazis kelkaj pugnobatadoj. Kiel diris la franca Pascal, estas pli facile trovi monaĥojn al argumentojn.

Tre rekomendinda estas « La virino ĉe la Eklezio », kolekto el ĉiuj la insultoj kaj malŝataj juĝoj de la Eklezio pri la virino, kiu estas samtempe ĝia ĉefa subteno kaj pli mizera viktimo.

P. L.

ANTVERPENO. — La 14 an de Aprilo niaj membroj de Antverpeno fondis lokan sekcion de nia Societo. Post nelonge oni elektos definitivan komitaton. Evidente estas ke tiu sekcio multe povas helpi, kaj helpos, la aranĝon de niaj specialaj kunvenoj dum la Sepa internacia Kongreso.

# Sepa Internacia Kongreso de Esperanto.

ANTVERPENO, 20-27 AŬGUSTO 1911.

### LITERATURA KONKURSO.

La detalojn pri la literatura konkurso, organizita de la « Sepo por la Sepa », niaj legantoj sendube jam legis en la naciaj esperantaj gazetoj. — Ni speciale atentigas ilin pri la de nia Societo proponita temo :

No. 9. « **Libera Penso en la moderna literaturo** » por kiu estas aljuĝata premion de Sm. 10 (Fr. 25.—).

Por kovri la eksterordinaraj elspezojn pro tiu konkurso, kiu samtempe estas bonega reklamilo por nia Asocio, ni malfermas monoferadon, al kiu, ni esperas, ĉiu membro alportos sian moneron. Oni sendu la donacojn al nia Sekretario kasisto : René Deshays, SENS (Yonne), Francujo.

UNUA LISTO

| | |
|---|---|
| René Deshays, Sens | Sm. 1.— |
| Hinglais, Sens | » 0.20 |
| Frans Schoofs, Antverpeno | » 0.40 |
| | Sm. 1.60 |

Pri la literaturaj konkursoj ni rememorigas, ke ĉiuj esperantistoj povas partopreni en ili. La manuskriptoj devos esti alvenintaj antaŭ la 1-a de julio ĉe la Sekretario-kasisto de la organiza komitato (adreso : Minderbroedersrui 76, Antverpeno). Ili ne povos esti skribitaj de la aŭtoro mem, kaj devos porti la numeron de la konkurso kaj devizon, kiun oni ankaŭ devas skribi sur fermitan koverton enhavanta la nomon de la verkisto.

# HISPANAJ PENSOJ.

La klaso vivanta per laboro de alia klaso povas esti pli forta, pli intelekta, pli ruza, sed ne pli morala ol la premata klaso. — PABLO IGLESIAS.

Popolo rezignanta estas popolo morta. — NAKENS.

La interesoj de la Patrujo, ne estas rajto por kontraŭstari la interesojn de la Homaro. — EMILO CASTELAR.

Ni devas batali pli kontraŭ nescieco ol kontraŭ malboneco de la homoj. — VERDES MONTENEGRO.

Paco estas juvelo, sen ĝi nenia bono povas esti sur la tero. — CERVANTES.

Politikisto, kiu ne scias kiel oni devas eduki la popolon, estas komediisto. — SALMERON.

Multfoje tio, kion oni nomas amo al Patrujo, nur estas amo al nia propra dececo. — B. FEIJOO.

Tradukis FERNANDO REDONDO.

# En Krakova Universitato

Interpelacio de la deputato Daszynski kaj de liaj kunuloj al la ministro de instruado pri la afero de persekutoj al lernanta junularo en la Krakova universitato, pro tio, ke la junularo protestis kantraŭ malŝato de scienco.

Vieno. Parlemento. Kunveno 80 de kunsido 20. 15 an de decembro 1910.

—

Dum la lastaj semajnoj, la Krakova universitato fariĝis scenejo de neordinaraj konfliktoj, kiuj profunde ekskuis normalan kuron de akademia vivo, kaj, krom tio, minacas disvastigi sin en baldaŭa tempo en aliajn universitatojn kaj haltigi sciencajn okupojn. La kaŭzo kaj esenco de la konfliktoj estas jenaj :

De longa tempo, lernanta junularo de Galicio deziris, ke estu fondataj novaj katedroj de sociaj sciencoj, kaj precipe katedro de sociologio. De longa tempo la junularo montradis la mirigan fakton, ke la ekzistantaj katedroj de sociaj sciencoj ne nur donitaj estas al la homoj de pli aŭ malpli klerikala direkto, sed ke, krom tio, la profesoroj, profesie okupataj per politiko, preskaŭ ne prelegas. En Lvovo, ekzemple, ni vidas la profesoron Glabinski, le prezidanton de pola rondo en Regna Konsilantaro kaj la profesoron Starzynski, la vicprezidanton de Regna Konsilantaro.

Unuvorte, la stato en ambaŭ universitatoj estas altgrade nekontentiganta, ĉar dum en universitatoj de la tuta mondo kreskas senĉese nombro de katedroj de sciencoj sociaj, kaj neordinare rapide multiĝas nombro de docentoj kaj seminarioj de tiu ĉi regiono, dum ardantaj sociaj demandoj, kiel ekzemple la demando laborista aŭ nacia deziras solvon, la aŭskultantoj de ambaŭ polaj universitatoj estas tute senigitaj de ebleco ekkoni sciencajn principojn pri sociaj demandoj. Justaj plendoj estis pli kaj pli oftaj, pli kaj pli laŭtaj.

En tiu periodo, nome en aŭtuno de la nuna jaro, eksciis la aŭskultantoj, ke vere fondita estis nova katedro de sciencoj sociaj. Tio ĉi okazis en fakultato teologia. Kaj invitita estis sur la katedron pastro Zimmermann el Poznanjo (Posen). La subjekto prelegota de la profesoro estis oficiale nomita : « La kristanaj sciencoj sociaj », kaj por sukcesigi siajn prelegojn en tiu ĉi regiono, pastro Zimmermann anoncis « publicum » (publika parolado). Tiu « publicum » estis plenumota unufoje ĉiusemajne, sub la titolo « La sociaj kaj terkulturistaj organizoj en Grandpolujo ».

Autaŭ ol ni aliros al karakterizo de la neordinara profesoro, kiu certe en neniu universitato de la tuta mondo havas sian similan, ni aldonu kelkajn faktojn por lumigi supre cititajn faktojn.

Antaŭ ĉio, kial oni bezonis novan katedron en fakultato teologia, kiu jam havas 9 profesorojn, kaj nur 90 aŭskultantojn ? Tiel malriĉa laŭ sociaj katedroj universitato bezonas prelegojn pri sociologio, pri historio de ekonomia evolucio, kaj oni donas al ĝi plian teologian katedron ! Evidente, agis, tie ĉi iaj deflankaj influoj.

Plue, kion signifas la « kristanaj » sciencoj sociaj ? Laŭ nia scio, en neniu aŭstra universitato estas tiel neordinara katedro, same kiel nenie estas katedro de izrealida astronomio aŭ de protestanta biologio. La titolo « La kristanaj sciencoj » enhavas principan kontraŭecon. Ĉar scienco estas bazita sur principo de sendependa, libera esplorado, kaj « kistana » signifas dogma. Klare do estas, ke la « kristana » scienco nepre devas fariĝi plena de antaŭjuĝoj, apologio de dogmoj, kaj sekve apologetiko. Kaj por apologetiko ne estas loko en universitato, kiu devas esti restadejo de sendependa esplorado, de la esplorado, al kiu nenia ordono, nenia apokalipso, nenia dogmo devas bari la vojon.

Dum oni postulas, ke profesoroj de katolikaj universitatoj deklaru anti-modernistan ĵuron, dum Romo severe persekutas plej malgrandan forlason de katolikaj dogmoj kaj tradicioj, ekzistado mem de teologia fakultato en universitato estas ridinda sensencaĵo. Kion estas faronta fondaĵo por dresada de ĵurintaj protektantoj de dogmaro en restadejo destinita por libera scienco ? La neerarema estro de Eklezio ĉiumomente povas per unu streko de plumo ordoni, ke « kristana » esplorado prenu alian direkton.

Kiamaniere oni povas en domo de sendependa penso toleri la ekostiĝintan dogmaron ?

Kaj plue : Ne sufiĉis ke estis fondata la katedro pri objekto tute ne scienca, ĉar apologetike kristana, sed ankoraŭ samtempe estis anoncita « publicum » en tiu ĉi regiono. Kiel ? kiacele ? La akademia estraro diris al la aŭskultantoj, por sin pravigi, ke la « publicum » ŝuldas sian ekzistadon ne al iniciativo de tiu estraro, nek de fakultato teologia, kiu proponis al pastro Zimmermann 6 horojn de teologio, sed ke ĉiopova en universitato Krakova Kardinalo Puzyna opiniis sufiĉaj 3 horojn, tial oni aldonis por kompletigo unu horon de « publicum ». La senkulpiĝo estas mallerta, ĉar vera intenco estis alia. La celo estas disvastigo de influoj teologiaj sur la aŭskultantojn de laikaj fakultatoj. La celo estas sistema klerikaligo de jam duone klerikaligita universitato. La celo estas nova akiro al militanta pastraro, kiu, kontraŭ persekutoj en Francujo kaj Portugalujo fariĝas pli kaj pli impertinenta.

Alia celo ankaŭ ekzistas. Delonge jam, la estroj de klerikalismo rigardadis maltrankvile la malkapablecon de siaj Krakovaj agitantoj. Sociala movo kreskis, ideoj progresemaj kaj antiklerikalaj pli kaj pli disvastiĝadis, klereco ekfaris gravajn progresojn. Oni devis tion ĉi haltigi. Oni opiniis, ke la haltigilo estas pastro Zimmermann, la partiano de bruta subpremo de tio, kio estas progresema, sana kaj sendependa. Oni volis venigi al si per ŝtata kosto, la viglan, klerikalan agitanton ; en tio ĉio estas esenco de la afero. Pli etaj lokaj peladantoj, de la speco de pastro Mytkowicz, estis tro malsaĝaj ; oni bezonis pli ruzan agitanton. Oni venigis al si Zimmermann, kiu eklernis klerikalajn trompadojn de tre saĝa ĉefepiskopo Stablewski.

Tamen, anstataŭ enterteni lin per monprovizoj agitadaj de partio klerikala, oni donis al li la katedron en la ŝtata universitato. Tiel estis pli malmultekosta.

Kiaj, tamen, estas la sciencaj kvalitoj de la nova profesoro ? Kiaj meritoj estas al scienco. Kiajn verkojn skribis pastro Zimmermann ?

La verkoj konsistas el kelkaj tre mizeraj disertacioj.

Jen : « Die Bank Przemyslowcow in Posen », malgrandampleksa seminaria disertacieto, germane verkita ; plieserio de agitadaj broŝuroj kontraŭ socialistoj ; fine ekfamita nun en Galicio libreto : « Mia sinjorino aŭ la skizo pri psikologio de pastraj mastriĩnoj ». Tiu ci stranga verko, kiu estis parte represita en folietonoj de opozicia gazetaro, kaj enhavanta ridindajn kaj malsaĝajn detalojn pri la kunvivo de pastro Zimmermann kun sia mastrino, senrevoke ridindigis « la profesoron » en Galicio kaj en aliaj landoj de Aŭstrio. Aperas la demando, ĉu estis la intenco de universitata estraro tiel senkompate ridindigi tre gloran universitaton ?

El aliaj « verkoj » de pastro Zimmermann, unu el la pli longaj, ĉar ĝis 70 paĝojn ĝi enhavas, estas : « kelkaj frazoj pri bezono de pastrara socia agado » (Posen 1906).

Tuj en komenco de I. ĉapitro, paĝo 9. oni povas legi :

« En Galicio allasis direktantaj faktoroj aperon kaj disvastiĝon de socialismo, kaj hodiaŭ ankaŭ kune kun plej belaj ekzemploj de socia agado aranĝita flanke de episkopaĵo ekzistas kaŭzoj de maldolĉa ĉagreno pro konata reteno de tiu ĉi agado en vastaj teritorioj de Galicio ».

El kio malbono devenas demandas pastro Zimmermann kaj konkludas, ke kulpa estas la malkapabla taktiko de galiciaj pastroj. En lia lando okazas alie :

« Nur ĉe ni, en Grandpolujo kaj en Okcidenta Prusujo, ne povas montri socialismo fortikajn akirojn, ĉar, kiel dum la estintaj jardekoj, niaj pastroj zorgis pri terkulturistoj kaj metiistoj, pri iliaj bezonoj kaj mizeroj, tiel, laŭ iniciativo kaj protekto de nia ĉefepiskopaĵa estraro, ili okupas sin nun per aperanta afero de moderna laboristo » (paĝo 9).

La aŭtoro do konsilas taktikon aliigi kaj sugestii al laboristoj, ke eklezio zorgas ankaŭ pri materiaj aferoj de laboristo :

« Apologetiko de agado estas la plej bona apologetiko. Kiam laboristo estos konscia, ke plej proksimaj al li reprezentantoj de eklezio ne kontentiĝas per konsolado al li per ĉielo, tiam li restos fidela filo de eklezio kaj tiam ne foriros certe en erarvojojn socialajn » (paĝo 15).

Ĝenerala movilo de verkoj de pastro Zimmermann restas ĉiam timo antaŭ socialistoj. En paĝo 63a ni legas : « Ĉiutage mi trarigardas la polajn gazetojn socialajn kaj mi devas esti konvinkita, ke ĉiam pli, la laboristoj transiras al sociala demokratio ».

Tiaj estas la inkuboj, turmentantaj tiun ĉi « esploriston »...

En broŝuro « Pri la asocioj laboristaj » nia « profesoro »

universitata diras : « Bedaŭrinde, multaj el ni, polaj katolikoj ekkaptataj estis per ilia (socialista) logilo, nesciante respondi al iliaj riproĉoj, faritaj al la fido kaj al la sankta eklezio. Ridetis al ili paradizo sur la tero, de socialistoj permesita, kaj, kvankam ĝis nuna tago tiun paradizon ne ekvidis, foriris al la socialistoj, kaj animon sian elmetis en kondamnon kaj familion sian en malhonoron, ĉar, kiel oni scias, la Sankta Patro metis anatemon al ĉiuj, kiuj apartenas al asocioj socialistaj, kaj ordonis rifuzi al ili kristanan enterigon ».

La broŝureton de la nuna profesoro pastro Zimmermann, sub titolo « Mia virinaĉo » ni jam supre citis. La titolo jena, ĉar ĝi la virinon de pastro Zimmermann ne kontentigis, anstataŭata estis en nova eldono de « Mia sinjorino ». Tiu ĉi ellaboraĵo, kiam ĝi aperis en Galicio, elvokis aplaŭdon de gajeco.

La senekzempla provoko de aŭskultantoj estas en tio, ke oni altrudis al ili tian individuon kiel instruiston. Anstataŭ sciencan sociologion ili ricevis « kristanan » sociologion, anstantaŭ profesoron, agitanton, anstataŭ esploriston, ekmokitan komikulon. La protestoj do de la aŭskultantoj estas tute pravigitaj, kaj indigno de l'Akademiaj estroj, kaj precipe de profesoro Czerkowski malprudenta. Minacado per forigoj tiaokaze estas provo turmenti ĉiujn studentojn, kun escepto de 90 teologoj, per instruado en la tiamaniere malestimata universitato.

Skandala malbonuzo estas, ke oni faris kontraŭ farintoj de la protesto, ĉe esploro disciplina ankaŭ esploron polican (laŭ deziro de la akademia estraro).

Kaj al la aŭskultantoj, kiuj, kiel kulpigitoj, uzas sian rajton malkonsenti konfesojn, la akademia senato kontraŭleĝe minacas per disciplina puno.

Subskribintoj demandas do :

Ĉu sinjoro ministro de instuado estas ema defendi veran sciencon en kies nomo prenzentas sin la junularo universitata en Krakovo, tio signifas :

a) forigi la strangajn profesorojn kiel pastro Zimmermann, pro manko de sciencaj kvalitoj.

b) rekomendi al la Estraro de krakova universitato, ke ĝi antaŭ ĉio flegu esencon de moderna scienco kaj influu la junularon en tiu ĉi direkto.

c) neniigi ĉiujn ĉikanojn policajn, defendantajn agadon malamikan al scienco, kaj trankviligi junularon akademian, ke plej malnova pola universitato ne fariĝos rifuĝejo de malklereco kaj de klerikala kontraŭscienca demagogio ? »

Sekvas 31 subskriboj.

Vieno, 15an de decembro 1910.
Tradukis Profesoro K. Wasilewski.

## Paroloj de Normando.

Pri la « Instruado de Kalkulscienco » de nia samideano kaj samasociano C. A. Laisant, unu el niaj amikoj sendas al ni la jenajn liniojn tradukitajn de artikolo presita en la gazeto « La Dépèche de Rouen ». La verkisto, nur malmulte konata, estas ja unu el la plej mirindaj noviguloj de pensoj de la nuna epoko :

R. P. (*) Fileas, tenis en la mano bluan broŝureton, naivan, senkulpan kiel libro de piaj kantoj — « Ĉu vis konas tion ? li diris al mi. Sed certe vi ĝin konas. La tuta spirito de diablo estas ĉi-interne ». — Mi vidis ke tiu diabla libro estas de Laisant kaj verkita por la instruado de la kalkulado.

« Kio ? mi diris al li. Mi admiras tiun amon de homo tre klera al buboj. por kiuj ĉio estas lernota. Anstataŭ resti sur la supraĵoj, de kie oni vidadas admirindajn perspektivojn, li malsupreniras al ni, li ebenigas la vojon ; li al ni montras apogilon por piedo, prenilon por mano. Ĉiuj supreniros iomete al aero pura kaj pura lumo, for el la marĉaro. Jen bona mont-irulo .»

« Viaj komparoj, diris Fileas, devus vin instrui. Ne estas multe da loko ĉe la supraĵo ; se ĉiuj grimpas al ĝi, oni batalos tie. Jes ja : karulo mia ; pro via frenezo, estos stranga Revolucio returnita, kiu estos nova falo de la diabloj, kaj vi ja tion estos volinta. »

« Ni estas, al li mi diris, bonaj diabloj ; ni volas nur iomete da racio en la adicioj. »

« Hipokriteco : diris Fileas, hipokriteco : Tiu broŝuro devus estus ruĝega, kaj vian novan aritmetikon oni devus kanti per la ario de la Carmagnole (Karmanjol **).

Frenezuloj, kiuj ĵetas viajn batalilojn al la sklavoj. Frenezuloj, kiuj laciĝas por kompreni, kio estas multiplikoto kaj multiplikanto, anstataŭ kompreni, kio estas societo, ordo, hierarĥio. La politikuloj de la malnovaj epokoj estis vidintaj grandan aferon, karulo mia, jen, iu homo estas vere homo nur se li scias kredi. La reĝoj adoris Dion nekompreneblan, la subuloj adoris povon nekompreneblan. Mi konfesas, ke tiuj aferoj estas mortintaj. Por novaj epokoj, necesaj estas novaj Dioj. Nu : ĉu ilin ni ne taŭge elpensis ? Ĉu la scienco « politeknika » (de la Pariza Lernejo Politeknika) ne sciis blindigi la popolamasojn, disĵetante al ili helajn radiojn tra la mallumoj ? Ĉu ne estas bela vidindaĵo, tiu instruado, kiu miregigis, kiu blindigis la plimulton, kaj desegnis ĉirkaŭ la povoj ian magian cirklon ? Kaj inter tiuj, kiuj eniris, mia kara Allain, kiom da blinduloj dresitaj : kiom da adorantoj, kiom da Politeknikuloj, kies scienco estis nur religio. Sekve, kiu ordo mirindega, se oni estus uzinta fidele la principojn : La tablo de Pitogoro estis nur alia Kateĥismo. Sed via diabla spirito posedas vin. Ni pagas vin, kiuj komprenas, por vin silentigi ; sed estas mono perdita. Vi volas, ke la lernanto demandu aritmetikon pri rezonoj, kaj, jen, la fervojistojn demandas la Kompaniojn pri kalkuloj. Nu, admiru la malrilatecon, en kiun vi estas forĵetita, tuj kiam oni forgesas la plej altajn principojn. La Politeknikulo scias tre bone rifuzi la kalkulojn, kaj jen li donas rezonojn. Kredu mim, prefereble estus doni kvinfrankan salajron al la fervojistoj, ol arimetikan sencon al la infanojn de la fervojistoj.

ALLAIN.

(*) R. P. — Révérend Père (Respektinda Patro) titolo donita en Francujo al iuj anoj de religiaj asocioj.
(**) Fama kanto revoluciema franca (1793).

## Pro kio ni solenas la Paskofeston.

Niaj prapatroj, la germanoj pli intime ol ni, konis la naturon. Kun granda intereso ili observis la vivadon de la naturo. Al ili tute ne restis kaŝita la fakto, ke je difinita tempo de la jaro la naturo manifestas novan agadon, novan vivon per kiu ili denove certigis al si la eblecon de plua ekzisto. Nemire, ke ili ĉiujare solenis tiun ĉi manifestacion de la potenca naturo. Laŭ ilia sperto estas ina la estaĵo, el kiu eliĝas nova vivo, tial devas esti ina la dieco, kiu eligis la novan vivon, same kiel patrino, filino, fratino, naturo, tero, tial estas ina en nacilingvo. La dieco je kies honoro oni solenis la tagon estas nomita Ostera, (germane Ostern ; A. S. Eastre, A. Easter. Pro tio, ke la estiĝo de tiu ĉi nova vivo devas esti profitdona, ili nomas la diinon Ostera, la diino de l'amo, la diino de l'nova vivo, la diino de l'reviviĝo de la naturo, unuvorte, la diino de l'reviviĝo, kaj finloke la Reviviĝo mem.

Kiam ornamis sin kampo kaj arbaro, montpinto kaj valo, kiam ĉie nova vivo en la naturo sin manifestas, kiam vidiĝas nova vivo en la grameneroj, en la arboj kaj en kreskaĵoj ĉiuspecaj, kiam fariĝis videblaj la unuaj signomarkoj de la plej delikata verdo, tiam ili renkontiĝis meze de la reviviĝinta naturo por oferdoni al tiu diino, al ŝia sekretplena naturpovo kaj soleni je ŝia honoro.

La israelidoj solenis tiutempe unu el siaj ĉefaj festoj la « Passahfesto », je la rememoro al la liberigo el sub la jugo de la egiptanoj, je la rememoro al nova espero.

Intertempe la naturo solenas la reviviĝon kaj admonis nin ke ni sammaniere, kaj samtempe solenu nian reviviĝon ; neniu ajn nenaturan kaj nekompreneblan reviviĝon sed veran kaj tuthomaran reviviĝon ; unu mistera ekleviĝo el longtempa vintrado.

NI SOLENAS LA PLEJ DIGNAN PASKOFESTON, SE ANKAŬ NI REVIVIĜAS KUN LA NATURO, SE NI REVIVIĜAS JE NOVA LIBERECO, SE NI FORTE-REAGOS LA POTENCAN ALVOKON DE LA NATURO. Ekzistas ankoraŭ multaj, kiuj havas okulojn, sed ili ne vidas ; ili havas orelojn, sed ili ne aŭdas. Do ĉiu liberpensulo havas kialon, bonuzi sian vidadon kaj aŭdadon por ke enigu en ili la alvoko, kaj lin refortigu al nova vivado, al nova laboro, al nova pli alta celo.

NI INDE SOLENAS LA PASKOFESTON, SE ANKAŬ NI REVIVIĜAS JE NOVA AGADO, SE NI REVIVIĜAS JE NOVA PENADO, JE NOVA CELADO.

La ondflueto de la rivereto, la muĝado de la ventego, la zumado de la abelo, la pepado de la birdaro, ĉio ĉi vokas : « vekiĝu ! » ĉio ĉi estas kantego por la nova libereco : Ni liberigis nin de la ligiloj en kiu la vintraj ventegoj nin rigidigis. Ili vokas al ni : « Vin liberigu de la ligiloj en kiuj vin metis la povo de la antaŭjuĝoj kaj la ventego de la pasioj ! » Se la tero starus senmove anstataŭ moviĝi, se la naturo restus, anstataŭ malrestiĝi, ne estus por ni la printempo la portanto de libereco.

NI LIBERPENSULOJ INDE SOLENAS LA PASKOFESTON, SE NI EKVIVIĜAS KUN LA NATURO AL NOVA LUMO ! La printempo estas alportanto de lumo ; ĉiutage ĝi donacas plimulte da lumo ; iompostiome cedas la nokto al la tago. Kia estas la lumo en la naturo, tia estas la ekkono en la homa estaĵo. « Kiel mi plenkreskas en la lumo », vokas al ni la naturo, « tiel vi ankaŭ plenkrekos en la ekkono ! »

NI LIBERPENSULOJ INDE SOLENAS LA PASKOFESTON, KIAM NI REVIVIĜAS KUN LA NATURO ; jes, reviviĝas al nova amo, al nova harmonio, al nova vivado. La printempo estas sendinto de l'amo. Kia estas la ardeco en la naturo, tia estas la amo, la harmonio de la tuthomaro kaj en la liberpensujo malgrandmezure. La lumo ne sufiĉas, sed la ardeco, la harmonio estas necesa. Amo kaj harmonio estas unuiĝo kaj kompletiĝo, tio vidigas nin la naturo en milopa formo.

NI LIBERPENSULOJ INDE SOLENAS LA PASKOFESTON, SE NI REVIVIĜAS KUN LA NATURO AL NOVA ĜOJO. La suno radianta, la arbo floranta, la kolumbumado, la kantado de la birdo, la ĉirpado de grilo, la zumado de la abelo, ĉio ĉi elspiras ĝojon. « Vi ĝoju kun ni ! » vokas al ni la naturo. Je la ĝojo ni estas naskitaj, ni ne estas destinitaj trairi funebre la vivon ! La vera liberpensulo estas nek skeptikulo, nek hipokritulo, sed li estas amiko de l'ĝojo de la vivo.

NI LIBERPENSULOJ INDE SOLENAS LA PASKOFESTON, SE NI REVIVIĜAS KUN LA NATURO AL NOVA ESPERO. La printempo ja estas varbanto de la espero. Monteto kaj valo, arbo kaj busko, arbaro kaj grameno, ĉiu sin ornamis per novkolora verdaĵo, per la koloro de espero. La verdo signomontras la floreton, la floreto la frukton, kaj la frukto signomontras la ĝuadon. Do ŝi instigas nin al espero, dum ke la unutona grizkoloro de la dumvintra tegilo de la naturo nin plenigas per timo kaj malespero. Ĉarmplena sunhela tago de la printempo plivalorigas la vivon, dum ke le la postaŭtuna tago la veran malon ekkaŭzas.

« Kiu ne deziras plu, tiu ne esperas plu,
Kiu ne esperas plus, tiu ne vivas plu. »

S-ino Ida S. Kurtz, Washington, D. C.

## VIRTO

Kio estas virto ? Bonfaro al proksimulo. Ĉu mi povas nomi virto ion alian ol tion, kio faras al mi bonon ? Mi estas senhava, vi estas donema ; mi estas en danĝero, vi venas min helpi ; oni trompas min, vi diras al mi la veron ; oni malzorgas min, vi konsolas min ; mi estas malklera, vi instruas min ; mi nomos vin sen malfacilo virta. Sed kio fariĝos la virtoj kardinalaj kaj teologiaj ? Kelkaj el ili restos ĉe la lernejoj.

Kial interesus min, ke vi estas sobra ? Tio estas regulo por sano, kiun vi praktikas ; vi fartos pli bone, kaj mi gratulos vin. Vi havas fidon kaj esperon, mi gratulos vin ankoraŭ pli multe : ili donos al vi la vivon eternan. Viaj teologiaj virtoj estas ĉielaj donoj ; viaj kardinalaj estas bonegaj kvalitoj, kiuj taŭgas por via konduto ; sed ili ne estas virtoj rilate al via proksimulo. La saĝulo faras al si bonon, la virtulo ĝin faras al la homoj. Sankta Paŭlo estis prava dirante, ke bonfarado superas fidon kaj esperon.

Sed kio : ĉu oni akceptos kiel virtojn nur tiujn, kiuj utilas al proksimulo ? He ! Kiel mi povas akcepti aliajn ? Ni vivas en Socio ; estas do vere bona por ni, nur tio, kio faras bonon al la Socio. Solulo estu sobra, pia ; li estu kovrita per pentovesto : nu, li estas sankta ; sed mi nomos lin virta, nur kiam li estos farinta ian virtan agon, per kiu la aliaj homoj estos profitintaj. Dum li estas sola, li estas nek bonfara nek malbonfara ; li estas nenio por ni. Se Sankta Bruno enkondukis la pacon ĉe la familiojn, se li helpis la senhavulojn, li estis virta ; se li fastis, preĝis en soleco, li estis sankta. La virto inter la homoj estas interŝanĝo ; kiu havas neniun parton en tiu ĉi interŝanĝo ne devas esti kalkulata. Se tiu ĉi sanktulo estus en la monde, li tie farus bonon, sendube ; sed dum li ĝin ne ĉeestas, la mondo estas prava ne donante al li la nomon virtulo : li estas bona por si, kaj ne por ni.

Sed, vi diros al mi, se solulo estas manĝema, drinkema, dediĉata al sekreta diboĉo kun si mem, le estas malvirta: li do estas virta se li havas la malajn kvalitojn. Jen pri kio mi ne povas konsenti; li estas tre malnobla homo, se li havas la difektojn kiujn vi nomis, sed li ne estas malvirta, malbona, punebla, rilate al la socio, al kiu liaj malnoblaĵoj faras neniun malbonon. Estas konjektinda, ke se li eniras en la Socion, li tie faros malbonon, ke li estos tie tre krima; estas eĉ multe pli kredebla, ke li estos malbona viro, ol estas certa, ke la alia solulo sobra kaj ĉasta estos bona. Ĉar en la Socio, la malbonaj kvalitoj pligrandiĝas, kaj la bonaj malgrandiĝas.

Oni faras kontraŭdiron multe pli fortan: Nero, le papo Aleksandro VI, kaj aliaj tiaspecoj monstroj, disdonis bonfarojn; mi respondas kuraĝe ke ili estis virtaj tiun tagon.

Kelkaj teologistoj diras, ke la dia imperiestro Antoneno ne estis virta; ke li estis obstina stoikulo, kiu, ne kontenta komandi al la homoj, volis ankaŭ esti estimata de ili; ke li rilatigis al si mem la bonon, kiun li faris al la homa gento, ke li estis dum sia tuta vivo justa, laborema, bonfara, pro vanteco, kaj ke li ne faris ion alian ol trompi la homojn per siaj virtoj: Tiam mi ekkrias: « Mia Dio, donu al ni ofte tiajn friponojn ».

VOLTAIRE.
Trad. Paul Linarés.

# LA SOCIETO

Amerikaj membroj bonvolu sendi kotizaĵojn kaj artikolojn al S-ro B. F. Schubert, Bureau of Pensions, Washington D. C. Usono. Kotizmono kun bulteno : 50 c. = 1 Sm.

---

Niaj hispanaj societanoj P. Linares kaj F. Redondo proponas kiel honormembron S-ron Fernando Lozano, kun jenaj pravigoj: S-ro Lozano, ankaŭ konita sub la nomo Demofilo, estas fondinto kaj direktoro de Las Dominicales (La Dimanĉaj predikoj). De pli ol 20 jaroj tiuĉi apostolo de la libera penso laboras sencese ĉe la gazetaro, ĉe sia ĵurnalo, ĉe la kunvenoj en tuta Hispanujo, eĉ en Ameriko; li suferis multajn persekutojn de la estraroj. Las Dominicales estas tre disvastigitaj kaj portas la bonan semon tra Hispanujo, Portugaluj kaj la tuta Latina Ameriko. Ĝi represigis nian cirkuleron, kun tre favora komentario; S-ro Lozano estas tute akirita al nia afero, promesinte subteni la proponon de Libera Penso ĉe la Internaciaj kongresoj, kie li certe havas influon.

Bonvolu skribe voĉdoni almenaŭ la komitatanoj pri tiu propono.

NOVAJ ALIĜOJ

D-ro Olshausen, Wartenau 5-a, Hamburg 23.
F-no Belle C. Saunders, 1603, Thirdst., Washington, U.S.A.
D-ro Will. F. Crow, Glen Easton, West Virginia.
S-ro P. J. Doyle, 812, Washington st., Hoboken, New Jersey.
S-ro H. H. Bergmann, 1444, Harvard st., N.W. Washington.
D-ro Tobias Sigrl, 507 Breitmeyer Bldg. Detroit, Michigan.
D-ro Ant. Niedzwiedzki, Podgorni per 4 Minsk, Ruslando.
S-ro Pasqual Canero, ĉe Gathes & Chaves, Santiago de Chile.
S-ro P. Staniŝiĉ, Vinkovci, Aŭstrio-Hungarujo.
F-ino J. Konstanti, 20 str. Muralla, Vendrell, Katalunujo.
S-ro Weisz, 124 Montenstraat, Borgerhout, Belgujo.
S-ro Salomon, 15, Oude Koornmarkt, Antwerpen.
S-ro Willekens, 27, Dahliastr. —
S-ro Schellens, 15, Lange Zavelstraat, —
S-ino Ceuleers, 77, Lange Scholierstr., —
S-ro Ceuleers, filo — —
S-ro Apers, 8, Burgers Welzijn, —
F-ino Marie Engels, 72, Lange Zavelstr., —
S-ro J. Coremans, 130, Provinciestr., —
S-ro Uytenbroeck, 20, Van Immerseelstr., —
S-ro Timperman, 36 Nijverheidstr., —
Eksiĝis : Davidov, Watters. Entute : 173 membroj.

KASO

## MARTO 1911

| | | |
|---|---|---|
| Enspezoj : | Reportite | 13.95 |
| Kotizaĵoj : Dauphin | | 2 50 |
| Vich | | 2.85 |
| Matuszewski, kun ŝuldo & donaco | | 3.75 |
| Niezwiedzki | | 2.50 |
| Sigrl (2 j.) | | 5 — |
| Mossmann | | 2.60 |
| Saunders, Crow, Doyle, Bergmann kun donaco de Schubert | | 12.85 |
| Por 2-jara kolekto | | 5.— |
| Por specimenoj | | 1.— |
| Vendo de broŝuroj p. Ferrer (Warnier) | | 5.70 |
| | Sume | 57.70 |
| Elspezoj : Papero | 0.40 | |
| Resendo de broŝuroj nevenditaj | 1.05 | 1.45 |
| | En kaso | 56.35 |

## Aprilo 1911

| | | |
|---|---|---|
| Enspezoj : | Reportite | 56.35 |
| Kotizaĵoj : Ivansky | | 2.40 |
| Canero (2 j.) | | 5.15 |
| Ges. Wolf & Svisa Bibioteko | | 7.40 |
| Staniŝiĉ | | 2.90 |
| Meunier | | 5.— |
| Weisz, Salomon, Willekens, Schellens, 2 Ceuleers, Apers, Engels, Coremans, Uytenbroek, Timperman | | 27.50 |
| | | 107.20 |
| Elspezoj : Poŝtmarkoj | 2.50 | |
| Kovertoj | 1.95 | |
| Sendelsp. de bult. 5-6 | 15.— | |
| Kovertoj, korespondo (Antwerpen) | 2.— | 21.45 |

En kaso : Fr. 85.75. (Sm. 33.97).

**DEZIRAS KORESPONDI** per ilustritaj poŝtkartoj: F-ino J. KONSTANTI, 20, Str. Muralla, Vendrell (Katalunujo, Hispanujo).

Liberpensulojn nepre interesos INTERNACIA SOCIA REVUO, monata Esperanta gazeto. Redakcio ĉe S-ro J. L. BRUIJN, Weimarstraat, 22, Hago (Nederlando). Abonprezo: jare 1.40 Sm; duonjare 0.80 Sm. Konto ĉe la Ĉekbanko Esperantista, London.

# LA REVUO

Internacia monata literatura gazeto kun la konstanta kunlaborado de

**D-ro L. L. Zamenhof.**

Administracio : HACHETTE & Kio
Paris. — 79, Boulevard St-Germain, 79. — Paris.

JARABONO : Francujo : Fr. 6.— (Sm. Fr. 2.40).
Ceteraj landoj : Fr. 7.— (Sm. Fr. 2.80).

**EN USONO** estas fondita UNITED STATES ESPERANTO ASSOCIATION (Usona Asocio Esperanta). Tiu nova asocio, kiu sub la prezido de nia ano B. F. Schubert estas tute demokrate organizita, espereble pligrandigos la vivon de nia esperanta afero en Usono.

# LINGVO INTERNACIA

CENTRA ORGANO DE LA ESPERANTISTOJ
Eliranta inter la 15 kaj la 20 de ĉiu monato

— LA PLEJ MALNOVA EL ĈIUJ GAZETOJ ESPERANTISTAJ —
Fondita en 1895

La Plej Enhavoriĉa! — **48** PAĜOJ da dense presita teksto en plej korekta kaj plej klasika stilo.

La Plej Malkara! — **5** FR. (2 Sm.) Abonprezo por UNU JARO

Por ricevi specimenon oni sendu unu poŝtan respondkuponon
Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

Presejo Esperantista ; J. B. Madou-Cop, Antwerpen.